É 100% Regular

Os verbos podem ser aprendidos em 10minutos.

Se tomar bom conhecimento, vai se apaixonar !

GISTO,OKT,2010

R.Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br

Donace por VK-ĉeestantoj.
Krom foraj loĝantoj, R$ 1,00.

.....

CIRKULERE:

Kun la celo sciigi ĉiun esperantiston kiu legos, ĉi bultenon mi ripetas la celon de senpage disdonata GISTO. Ĝi daŭru kiel solidariga ligilo, ĝi proporcias almenaŭ simplan unumonatan legaĵon ĉefe kun informoj pri Esperanto kaj por la esperantistaro ĝenerale. Tial ne foraj ,loĝantoj ricevos ĝin perpoŝte aŭ pere de la retejo, esceptokazo, por ĉimonata cirkulero, por ke ĉiu sciiĝu ke oni devas almenaŭ montri sian vizaĝon kaj esti vidata de la publiko.

SOS BONAESPERO

Por sciigi la verdan anaron pri kio tre grava okazis sur la Bieno Bona Espero mi aldonas leteron senditan al gravuloj de la ĉina periodaĵo MIKROFONE. Se vi ne sciiĝis antaŭe, la enhavo de la letero iel ĝisdatigos vin.

Mi kaptas ĉi kunsidon por tuj proponi ke ni arigu po unu foston donacitan de ĉiu el ni. Kiu kolektos la monon bv preni sur sin la taskon sendi ĝin laŭ la banka konto montrata en la letero.

.....

(Kopiaĵo) KAIURBO, 07.10.10.

ALTESTIMATAJ SINJOROJ
Xia Jixuan kaj Guo Xiaoyong
Pekino-CHINIO.

I – Al la redaktejo de Mikrofone mi ensendas ĉikune aldonite foton okaze de la Septembra VERDA KAFO, jam tradicia ĉiumonata kunsido, kiu okazas de pli ol 30 jaroj, en la lunĉejo Tuty's, en nia ĉefurbo Porto Alegre-RS. Eble vi preferus malpli grandan bildon kaj tiukaze la redaktejo mendos adekvatan foton por vialanda tre aprecata periodaĵo, mi esperas.

II – Aldone mi memorigas pri la serioza fajrego kiu detruis multajn hektarojn da arbaro kaj kampon sur la fame konata nesto de Esperanto, Bona Espero, kiu situas 220Km norde de la brazila ĉefurbo Brazilja. La incendio, dum ĝi avancis de la norda flanko, detruis ĉ.5Km da barilo el pikildrato kies lignaj fostoj tute perdiĝis. Ĉio devas esti refarata sed mankas manlabora helpo ,krom la necesa mono. La bonaesperanoj lanĉis kampanjon: Ĉiu bonkora esperantisto bonvolu alsendi unu betonan foston kiu kostas tie 22 Realojn. - Tial ke nuntempe en Brazilo oni pli kaj pli ofte ekvidas ĉinajn literojn sur vialandaj varoj, la simpla popolo lernas admiri vialandan grandan prosperon. Mi kuraĝas proponi ke viaj moŝtoj bv interveni ĉe adekvataj instancoj por ke Ĉinio fariĝu aplaudata tra la tuta mondo kiam oni ripete diskonigos viaflankan donacon favoran al Bona Espero. Estas ja bone konata ke la veteranaj kaj tre seriozaj administrantoj estas la geo Gjuzepe Grattapaglia (italo) kaj Ursula (germana).

III – Antaŭdankon por io ajn favora kio el vi fluos al BonEspero!

NOTO – Banka Konto: Banco do Brasil – Agentejo 4546-2 – Konto:400280-6 por Fazenda Escola Bona Espero.

Respektoplene,

George Otto Vaske

BONVENAS KRITIKOJ KAJ ,HELPOJ

La septembra VK-kunsido kalkulis belan nombron da E-amantoj, jes tiel mi kvalifikas la homojn kiuj ne bedaŭras investi iom el sia libera tempo plus kelkajn groŝojn en nian idealon, la tradician renkontiĝon. Kelkaj elpoŝigas pli ol simpla enurba busbileto. Kelkaj rondanoj ne atendas inviton sed malavare kontribuas por la konsumaĵoj. Rapide seso da boteloj de bongusta biero sekiĝas. Nia kunsido ja estas mikrofesto, se oni memoras ke pluraj gesamideanoj ne montras sin dum longa tempo. Estiĝas interesaj temoj. Dum la septembra, (nur) nia kara italido respondis al demandon lanĉitan kiel vi tradukus “festa cítrica”? el teksto far D.Koimbra. Vortaroj ne helpis trovi adekvatan sinonimon. Mi provis lasi en la teksto la tendencon de la aŭtoro, uzi vortojn malmulte legatajn. Zaghetto proponis, laŭ praktika solvo diri «oranĝa festo». Manke de pli adekvata ni devis kontentiĝi per almenaŭ unu propono prezentita. – Domaĝe, reagoj al en Gisto faritaj demandoj raras. Tio tamen devus ne okazi. Multaj reagoj estigas viglajn debatojn kaj el tio la partoprenntoj lernas formuli respondojn, parkerigas novajn vortojn kaj dirmanierojn...pro-gres-son!

RECiTADO

Tre agrable surprizis la ĉeestantojn en nia lasta babilrondo, 25/09, nia diligenta instruisto Cezar Dorneles. Antaŭ ol stariĝi por adiaŭo, mi kutime demandas la kompanojn, kiu el ili bonvolas stare reciti etan tekston, por esti aŭdata krom de la rondanoj ankaŭ de atenta publiko kiu ĉirkaŭas nian tablon. Cezar sin anoncis kaj flue recitis adekvatan poezion per sia tondra voĉo. Li ekzemplon donas al la ceteraj kiuj ankoraŭ ne kuraĝis parkerigi ion edifan. Mi intense aplaŭdas tion. Ĉi oldulo fuŝe diris la strofojn de “Kanto de Soldato” por ke ĉiuj sentu sin vokataj por pli lerte reciti ion mem elektitan .

VERKADO

Neniu kontaktis min tiucele, Tio, por mi signifas ke la gaŭĉaro scias esperanton eĉ por instrui veteranojn...do neniu plene pravigas sin pro manko de reagoj al provokoj faritaj pere de Gisto. Tio pensigas pri pigro.

PROPONO

Ĉiu VK-rondano elektu ses algarisman MEGA-SENA-veton (ses duopojn), informu la rondanojn kaj partoprenu ĉiufoje post kiam la premio atingas kvinmilionojn(aŭ pli).Ĉiu restu libera fari samtempe hazarda(j)n vetojn Nia kara lingvo meritas la eksperimenton por tiamaniere havigi al si belan fonton kiu utilu por instruado kaj propagando? La informo de la seso elektita estu por ke, certa grade, ni ĉiuj havu ideon pri la rezultato post ĉiu vetotago kaj motivo de babilado.

Bonhumoro.

ALTA KOSTO

Paradema gaŭĉo, pro snobo volis defili tra la RuadaPraja per tute nova botoparo. Li vizitis botiston, elektis modernan modelon el porka ledo. mendis kaj rekomendis, ili estu belegaj. La botisto, krom evalui liajn piedojn ankaŭ registris en kajero la necesajn mezurojn kaj nur diris: lasu la aferon je mia zorgo Post unu semajno ili estos pretaj. La gaŭĉo demandis la prezon.- Du mil kvincent realojn, li aŭdis. La gaŭĉo «defalis de sur la ĉevalo»**!...sed kial tiom da mono, kara metiisto? Tia kvanto ja kompareblas al ŝtelo, se en sep tagoj Dio faris la tutan mondon! Jes, diris la botisto, sed ne laŭ ĉies prefero.
Noto * =Trompiĝo, elreviĝo.

NE DISIĜO, SOLIDARECO FORTIKIGAS LA E-MOVADOJN!!